



ESPERANTO

OKTOBRO 1960

53 a Jaro — N-ro 659 (10)

esperanto

REVUO INTERNACIA

OKTOBRO 1960

53 a J A R O

N-RO 659 (10)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino : S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1960): 9,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 323034.

LA FRONTPAĜA BILDO :

Harrogate, la kongresurbo en 1961 (vidu la artikolon paĝo 165).

Enhavo

Harrogate	165
Belarta Konkurso 1960-1961	166
La Stelmoneroj	166
La II. Int. Pedagogia Semajno	167
La K.E.L.I.-Konferenco	168
Revido kun Budapesto	169
Konstrufakulo de UN	170
Astronomoj-Esperantistoj	171
Esperanto en Krakovaj Liceoj	173
Ne ricevi, sed doni	175
La 33-a kongreso de SAT	179
APO kaj la Poŝtmarkoj	179

Rubrikoj :

La Int. Konkursoj 1960	168
Magnetofona Servo de UEA	172
Tra la Mondo	174
La Juna Vivo	176
Radio	176
Novaj Libroj	177
Belartaj Konkursoj 1960	178

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Harrogate

Kongresurbo de la Nordo

Harrogate troviĝas en la okcidenta regiono de Yorkshire, 320 km de Londono kaj de Edinburgo, kie okazos la antaŭ- kaj post-kongreso. La fervoja servo estas rekta kaj ekspresa. Aŭtomobilistoj povas veturi facile de Londono sur la Granda Norda Ŝoseo.

La urbo havas mildan klimaton kaj la aero estas freŝa kaj vigliga. Ĝi estas centro por esplorado de la belaj jorkŝiraj erikejoj.

Harrogate estas fama kiel kuracloko; la akvo de ĝiaj fontoj havas medicinajn kvalitojn, kiujn alte ŝatis la angla reĝo Georgo la III-a. Kvankam multaj ankoraŭ iradas al la urbo por sia sano, aliaj vizitadas ĝin por ripozi kaj ferii. Unu el la allogaĵoj estas la multaj ĝardenoj kaj floroj kiuj certigas ke, kien ajn oni iras aŭ rigardas, vidiĝas riĉaj koloroj kaj ravaj florbedoj. Koncertoj kaj aliaj muzikaj distraĵoj regule okazas, kaj la urba teatro subtenas bonegan repertuaran trupon.

La etoso de la urbo estas tipe brita, sed la homoj de la regiono havas aldone apartajn trajtojn. Oni ofte ŝercas pri la silentemo de la Yorkshire'anoj, kaj ili estas famaj pro komerca kaj praktika sinteno. Ili parolas apartan dialekton de la angla lingvo, kiu certe estas malfacile komprenebla por tiuj kiuj studis nur la norman anglan lingvon. La ĉefa industrio de la graflando estas la lanteksado, kvankam Harrogate enhavas nenian fabrikan aŭ uzinon. Al la kuirarto la regiono kontribuis la faman jorkŝiran pudingon faritan el bakita farunpasto kaj gustigitan per viandosuko. Nur en Yorkshire mem oni povas ĝui la malfalsan pudingon. La kamparo apud Harrogate estas tre ĉarma kaj interesa. La erikejoj estas la hejmo de la ruĝa tetro kaj tial multe vizitata de pafsportistoj, sed preter la erikejoj troviĝas pejzaĝo de tute malsama speco: la famaj jorkŝiraj valoj. Ĉi tiuj valoj

antaŭe enhavis prosperajn plumb-minejojn sed nun provizas riĉajn paŝtaĵojn por bovoj kaj ŝafoj. La valoj tamen aspektas sovaĝaj kaj la pejzaĝo estas beligita per multaj akvofaloj. En la valo de la rivero Ure fariĝas la fama Wensleydale fromaĝo kaj en la sama valo troviĝas la kastelo Bolton, iam malliberejo de Mary, reĝino de la Skotoj.

Apud Harrogate oni povas esplori altajn antikvajn kastelojn, preĝejojn, abatejojn ktp., ĉiuj arkitekturaj trezoroj kaj samtempe plenaj de historio. Elegantaj domoj ankoraŭ enloĝataj estas vizitindaj pro la bela konstruaĵo, la agrablaj ĝardenoj kaj parkoj kaj la viva historio tie studebla.

Oni ne devas supozi ke Harrogate nur taŭgas por ĝuado de la beloj de la urbo kaj ekskursoj al la najbara kamparo. Ĝi estas kompakta urbo (52000 enloĝantoj) kun bonaj kaj ne tro multekostaj hoteloj. Teatro kaj diversaj haloj taŭgas por ĉiaj kunvenoj kaj estos je la dispozo de la kongreso. Efektive Harrogate nun fariĝis treege populara konferencurbo kaj la kunvenejoj estas ideale aranĝitaj por tiu celo. Plue okazas flora fotografaĵa kaj antikva ekspozicioj ĉiujare, tiel ke estos bonaj ebloj por ekspozicioj en kunligo kun la artfesto. La teatro ankaŭ estos je nia dispozo por dramoj. Ni kredas kaj esperas, ke ĉiu kongresano trovos en la urbo tion kion li deziras, ĉion bezonatan por bonaj kaj efikaj laborkunsidoj, ĉion bezonatan por bonaj kongresaj amuzaĵoj, ĉion por riĉaj artoprezentoj, ĉion por eksterkongresa ĝuo, ĉion por rendezuoj kaj trankvilaj horoj; resume, ĉion bezonatan por sukcesigi la plej gravan manifestacion de nia movado por la jaro 1961, la 46-an Universalan Kongreson de Esperanto.

D. A. Bloxham

**Aliĝu al la 46-a Universala Kongreso de Esperanto
en Harrogate!**

BELARTA KONKURSO 1960

La prokrastitaj rezultoj :
Literatura branĉo :

Sekcio 1; originala poezio :

1. S-ro Jiří Kořinek, Brno, Ĉeĥoslovakio ("Romanco F-majora de Beethoven".)
2. S-ro Ludoviko Izák, Martin, Ĉeĥoslovakio, (Al Altaj Tatroj")
3. S-ro A. Sándor Császár, Pápa, Hungarujo ("Mi staras antaŭ via kruco, sinjoro")

Sekcio 2; tradukita poezio :

1. S-ro Albert Samyn, Bruselo, Belgujo ("Adiaŭa kanto" el flandra originalo de P. C. Hooft 1581-1647)
2. S-ro Albert Samyn (kiel supre) ("Luna ĉe Endimion" el flandra originalo de Hubert Poot)
3. S-ro Miyamoto, Japanujo ("Amo sur plaĝo" el jap. orig. de Satō Haruo)

Sekcio 3; originala prozo :

1. S-ro Albert Samyn, Bruselo, Belgujo. (Novelo : La komisio.)
2. S-ro Salvador Guma, Reus (Tarragona), Hispanujo. (Novelo : Feliĉan Novan Jaron!)
3. dividita inter :
F-ino Willy Smit, Amersfoort, Nederlando. (Novelo : Pudrita peruko.) kaj S-ino Emilja Lapenna, Zagreb, Jugoslavio. (Eseo memore al A.P. Ĉehov : Tosto al la morto.)

Sekcio 4; originala dramo :

3-a kaj sola premio :

S-ro Albert Samyn, Bruselo, Belgujo.
(Radiokomedieto : La nubaj nomadoj.)

"Nova Talento" (la plej bona verko de konkur-santo premiita nek en la nuna konkurso, nek en la antaŭaj) :

S-ro Giuseppe Grattapaglia, Torino, Italujo.
(Novelo : Taglibro de terloĝanto.)

La rezulto de la konkurso Comella-Bassols (pri gaja rakonto en Esperanto) sekvos.

Gerald C. Jervis, (Sekretario)

BELARTA KONKURSO 1961

La detala regularo por partopreno en la Belarta Konkurso 1961 aperos en la venonta numero de la revuo "Esperanto". Intertempe, oni avizas konkursemulojn, ke la regularo por la konkurso de 1960 (kiu aperis en la numero de Marto 1960) esence validas ankaŭ por la konkurso de 1961.

Aldone, oni invitos partoprenon en la kongreslanda branĉo. Oni proponos tri premiojn por tradukoj el la poemoj de la fratinoj Karlota, Emilja,

kaj Anna Brontë, kiuj naskiĝis, loĝadis, verkis, kaj mortis (tragiike frue) en la angla gubernio Jorkŝero, en kiu staras Harrogate, kongresurbo de la 46a U.K. de Esperanto. Ankaŭ detaloj de tiu branĉo aperos en la venonta numero.

Gerald C. Jervis, Sekretario

La Stelomoneroj

Ĝuste antaŭ la presigo de la jul./aŭg.-numero de "Esperanto" aperis la stelomoneroj kaj ni havis ankoraŭ okazon skribi pri ili en tiu numero. Intertempe la moneroj komencis sian vojon tra la mondo. Dum la Universala Kongreso en Bruselo centoj da esperantistoj havigis ilin al si, ne nur por konservi kiel kuriozaĵon, sed ankaŭ por aĉeti. La kongresa librostando kaj ankaŭ la budo de U.E.A. ricevis pagojn en steloj.

Dum ĉiuj kongresoj oni spertas la grandajn ĝenojn de la valutaj baroj, same detruendaj kiel la



En la ŝtata Monfarejo de Nederlando la Estro solene transdonas la unuajn ekzemplerojn de la moneroj al la Estraro de Universala Ligo. De maldekstre dekstren : la Estro de la Monfarejo D-ro J. W. A. van Hengel, la kasis-to de U.L. Inĝ. H. E. L. Voitus van Hamme, la vic-prezidantino de U.L. S-ino J. C. Isbrucker kaj la ĝenerala sekretario de U.L. S-ro Andreo Cseh.

lingvaj por atingi glatan internacian funkciadon kaj kunestadon. Ju pli enkondukiĝos la stela valuto, ju pli oni alkitimiĝos al uzado de unu internacia mono unue en tiu medio, kiu jam alkitimiĝis al uzado de unu internacia lingvo, des pli kreiĝos ligoj de internacia solidareco, des pli sentiĝos la aparteno al unu tuto, la mondo.

Estas la merito de Universala Ligo ke ĝi kuraĝis fari tiun grandegan paŝon de la enkonduko de internacia mono; merito precipe de ĝia eminenta sekretario S-ro Andreo Cseh, kiu kun granda fantazio kaj samtempe kun granda klarvido kaj sento por la realaj eblecoj iras la vojon indikitan de la Statuto de U.L., siavice bazita sur la konceptoj de Zamenhof.

daŭrigo p. 179

La II. Internacia Pedagogia Semajno en Bohinj (Jugoslavio)

De la 15-a ĝis la 25-a de julio okazis en pitoreska slovena loko Bohinj (Jugoslavio), ĉe la bordo de bela montara lago, la internacia seminario por instruistoj. La aranĝo okazis sub la aŭspicioj de UEA kaj la jugoslavia UNESKO-Komisiono. La partoprenantoj venis el 7 landoj (Jugoslavio, Aŭstrujo, Francujo, Svislando, Svedlando, Danlando, Nederlando). Ili aŭskultis la referaĵojn kaj pridiskutis la ĉiam pli kaj pli aktualan problemon pri Esperanta instruado al infanoj en internacia kadro. En la proksimeco de la Junulara Hejmo, kie okazis la seminario, tendumis infanoj-esperantistoj, apartenantaj al 5 nacioj.

La programo de la seminario mem estis varia: ĉiutage 2-3 referaĵoj kun diskuto. Enkonduke la prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Federacio, *Peter Zlatnar*, kiu gvidis la seminarion, substrekis la neceson plialtigi la Esperanto-instruprogramon en la lernejoj, la neceson ne nur limiĝi al la akiro de lingvoscio, sed ankaŭ enkonduki la junajn esperantistojn en la aktivan esperantistan vivon kaj movadon, instigi kaj gvidi la korespondadon, kunlabori en infanaj gazetoj, helpi al la instruado de aliaj instruobjektoj ktp.

La unua preleganto Akademia Prof. *Rudolf Rakuša* substrekis la neceson pri la praktika apliko post akirita lingvoscio. Jam dum la instruado oni trovu la plej konvenan organizan formon: grupon, rondon, sekcion, klubon kiel parton de la Pionira aŭ Popoljunulara Organizaĵo. Instruisto devas uzi sobrajn ciferojn, bonajn argumentojn, realajn atingaĵojn — diris Prof. Rakuša. Esperanto certe ne forigos ĉiujn sociajn kaj politikajn malfacilaĵojn. La entuziasmo povus esti bonaj sed ankaŭ malutilaj. Tiuj kiuj vekas falsajn esperojn, ĉiam malutilas.

La dua preleganto, *Petar Vukomanović*, parolis pri la kompletigo de la instruprogramo, pri kunlaboro de esperantistoj en la nuna lerneja reformo. Speciale li substrekis, ke la kontribuo de Esperanto povas esti plej efika en geografio (kompletigo de lernejoj geografiaj kabinetoj per diversaj instruhelpiloj el la tuta mondo).


La prelego de *Marcel Erbetta* (Svislando) kaj la praktikaj demonstroj de geesperantistoj *Leo Lentaigne* (Francujo) kaj *Sonja Tavčar* (Jugoslavio) estis iusence la supro de la seminario. Marcel Erbetta prelegis pri la celo de "Grajnoj en Vento", pri funkciado de la rondoj, kaj li prezentis ankaŭ iom da statistiko (hodiaŭ en "Grajnoj en Vento"

kunlaboras 70 klasoj) kaj donis kelkajn ekzemplojn el la 60 eldonitaj kajeroj. Post tio li donis direktivojn en praktika uzo de la kajeroj. Parolante pri praktika apliko de Esperanto post akirita lingvoscio li konstatis, ke la Internacia Lingvo eksterordinare helpas al la instruado de geografio (ekz. la klaso de S-ino Thorsen en Kopenhago, vidu raporton en "Esperanto" okt. 1959), same al instruado de zoologio, botaniko, sociaj sciencoj, literaturo, muziko, folkloro, manlaboro ktp. Li tuŝis ankaŭ kelkajn aliajn problemojn: centran korespondan servon pedagogian, konkursojn inter diverslandaj klasoj, internacian legolibron por la supera kurso de Esperanto, radio-elsendojn kaj televidprezentadon en Esperanto, E-librojn por infanoj, eksterlandan paĝon pedagogian en naciaj pedagogiaj gazetoj, poŝtan tarifon pli malaltan por interlerneja korespondado k.s.

La prelegon de S-ro Erbetta sekvis vigla diskuto, en kiu partoprenis multaj geinstruistoj, lumigante la aktualajn problemojn.

S-ro *Lentaigne* parolis pri franca pedagogia movado Treinet, kiu konsistas en tio, ke la infanoj mem en la lernejo skribu, presigu, eldonadu kaj disvastigu sian gazeton. Por praktike montri la laboron li gvidis la redaktadon kaj eldonadon de aparta Bohinja numero de "Grajnoj en Vento", kie la infanoj priskribis siajn travivaĵojn dum tendumado, banado kaj boatado en la lago, ekskursojn ktp.

Estas neeble en la kadro de unu artikolo bone kaj ĝisfunde prezenti la riĉecon de la tuta semi-



Vidaĵo al la Junulara Hejmo (maldekstre) kaj tendaro (dekstre).

Foto: Gabrijel Strah, Ljubljana.

nario. Oni aŭdis 15 prelegojn, kaj pri ĉiu oni ankaŭ diskutis tre detale.

Stevan Djalinaĉ prelegis pri kunlaboro de Jugoslavia Esperantista Asocio kun diversaj junularaj organizaĵoj.

Svobodan Zlatnar prelegis pri interna vivo de lerneja grupo, sekvante la agadon de lerneja grupo de fondiĝo ĝis la fino de esperantista instruado.

Radmila Matić prelegis pri la rolo de gelernantoj, gepatroj, instruistoj kaj lernejoj instancoj en lerneja kampanjo, menciante ekzemplojn de la lernejoj "Marija Bursaĉ" kaj Ekonomia mezlernejo en Beograd.

Peter Zlatnar prelegis pri kultura, eduka kaj kleriga laboro kaj *Ivo Rotkvić* parolis pri E-literaturo kiel kompletiga legaĵo.

Interesajn aldonojn al la diskuto donis S-ro *Poul Thorsen* (Danlando), *Olle Olsson* (Svedlando), *Van Densen* (Nederlando) kaj *Jozef Mraz* (Aŭstrujo).

Oni ankaŭ tre serioze pridiskutis la tutmondan

instruistan organizaĵon, kritikis ĝian nelaborem, la fakton ke la nura pedagogia revuo mortis kaj ellaboris konkretajn konkludojn por ĝia revigligo. Finfine ne estas superflue menci, ke dum tiuj 10 tagoj la plurnacia centmembra instruista grupo en Bohinj vivis amike, perfektigis amuze sian lingvoscion, vizitis najbarajn montojn, ĉie parolinte nur Esperanton kaj tiamaniere vekis ankaŭ atenton inter aliaj turistoj en tiu bela loko ĉiam vizitata de multaj fremduloj. Ni devas menci ankaŭ tion, ke detala (7-paĝa) raporto kun sugestoj al UEA estis prezentita dum la Kongreso en Bruselo. Ĝi enhavas sugestojn rilate la instruadon, kompletigon de instruado en lernejoj, klerigan edukon kaj kulturan laboron, koncerne la rolon de ILEI kaj TEJO kaj iliaj landaj sekcioj. Pli detala raporto aperis en "Jugoslavia Esperantisto" n-ro 6-7.

(*BID*)

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1960

Stato je la 31-a de aŭgusto

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2470	2860	115.79
2.	Nederlando	5093	5291	103.89
3.	Belgujo	1985	2046	103.07
4.	Britujo	6565	6624	100.90
5.	Usono	3430	3410	99.42
6.	Francujo	7111	7028	98.83
7.	Svislando	2075	2045	98.55
8.	Finnlando	2515	2400	95.43
9.	Germanujo	7450	6990	93.83
10.	Svedujo	6605	6120	92.66
11.	Norvegujo	2035	1868	91.79
12.	Hispanujo	2837	2535	89.35
13.	Danlando	2921	2450	83.88
14.	Italujo	4469	3745	83.80
15.	Jugoslavio	7155	3335	46.61
16.	Brazilo	8260	2931	35.48

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	815	920	112.88
2.	Aŭstrujo	1425	1565	109.82
3.	Aŭstralio	1076	1121	104.18
4.	Sudafriko	250	255	102.—
5.	Kanado	615	620	100.81
6.	Israelo	250	240	96.—
7.	Portugalujo	575	535	93.04
8.	Urugvajo	255	230	90.20
9.	Novzelando	989	810	81.90
10.	Madagaskaro	250	197	78.80
11.	Islando	270	205	75.93
12.	Maroko	256	190	74.22

La K.E.L.I. - KONFERENCO

De la 23-a ĝis la 30-a de julio la Kristana Esperanto-Ligo Internacia havis siajn Konferencon kaj Jar-

kunvenon en Cadzand (Hedenesse) en suda Nederlando. Partoprenis 90 personoj el 8 lingvoteritorioj. La Kongres-temo estis: "Aktualaj problemoj en la vivo de la Kristano". Pri tiu temo parolis i.a. pastoro T. Ilmari Haapalainen el Finnlando. Krome pastoro A. Burkhardt el Germanujo prelegis pri: "La nova ŝtato Israelo". La Diservon en la Reformita Preĝejo en Cadzand gvidis profesoro W. J. Downes el Anglujo. Tie kantis angla ĥoro kaj solkantistino Jelly Koopmans.

En la interkona vespero, kiun s-ro H. A. de Hoog, la prezidanto, malfermis, la Konferenco havis oficialan interesiĝon de la urbestro kaj pastoro, kiuj esprimis sian ĝojon ke oni elektis ilian lokon por kunveno. Krome ĉeestis s-ro G. J. van Oorschot el Sluis, del. de U.E.A., kiu prezentis sian helpon kaj kiu aktive helpis en la bona sukceso de la festo. S-ino Anna Alamo parolis elokvente kaj kortuŝe pri la temo: "Ĉiam sur reloj al novaj celoj", en kiu ŝi rakontis pri siaj spertoj kiel "vojaĝanta sekretariino de la Sveda KELI-sekcio" en Ĉeĥoslovakujo, Greklando kaj Turkujo.

En la vespero antaŭ la tuttaga ekskurso la direktoro de "Hedenesse", S-ro Wasterfal, klarigis per lumbildoj la ekspozicion en Brugge pri: "La Jarcento de la Flandraj Primitivuloj". La sukceso de tiu prelego montriĝis la sekvintan tagon kiam oni en la rilata muzeo montris unu al la alia la detalojn de la pentraĵoj. Post tiu vizitado al Brugge oni vizitis Iperen kaj la belgajn banlokojn. Oni vizitis ankaŭ la insulon Walcheren.

En la ferma kunveno afablaj vortoj estis eldiritaj, kiuj pruvis ke oni estis kontenta.

Belega vetero pliagrabilis la sukcesplenan Konferencon.

En 1961 la Konferenco estos en Bristol (Anglujo) kie oni festos la oran jubileon.

J. D. B.

LA REDAKCIO

informas, ke pro la ampleksa septembra numero (la kongresnumero) de la revuo, ĉi tiu numero enhavas nur 16 paĝojn + la 4 kovrilpaĝojn. Estonte la revuo denove havos ĉiam 20 paĝojn.

Kirsten Zacho

REVIDO KUN BUDAPEŝTO

Kvin jaroj pasis post mia unua vizito en Budapeŝto 1955, tre severa periodo por la hungara popolo. Ĉiam mi revis revidi Budapeŝton, kiu jam tiam, 10 jarojn post la milito, denove meritis sian malnovan nomon: reĝino de Danubo. Tamen mi iomete timis revidon pro la teruraj okazintaĵoj en 1956. Ĝuste tial estis granda mia ĝojo trovi viglan urbon en bela printempa vestaĵo, eĉ pli bela ol en 1955, kun ĉiuj vundoj resanigitaj, butikoj kun multaj varoj, pli da ridoj sur la vizaĝoj kaj pli vigla Esperanto-movado. Ŝajne la vivo jam pasas pli facile.

La unuan fojon mia edzo kaj mi venis en ordinara turisma societo. Kompreneble ni kiel esperantistoj havis plenan profiton de la vojaĝo kaj persone konatiĝis kun Kalocsay, Baghy, Lajos Marton kaj multaj aliaj hungaraj esperantistoj.

Ĉi tiun fojon mi venis kiel prelegistino, invitita de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, kun la ĉefa tasko raporti pri miaj spertoj rilate al la eksperimenta Esperanto-instruado en Kopenhago.

La revido kun la Esperanto-movado ankaŭ estis agrabla surprizo. Ŝajne okazis miraklo post 1955. Dank' al energia kaj senlaca laboro la movado ege kreskis dum la lastaj jaroj. En 1955 nur duon-oficiale kunvenis la esperantistoj; nun la ŝtato eĉ subtenas per sufiĉe granda jara monsumo. Tiu fakto ebligas al la Konsilantaro havi propran oficejon kaj inviti ĉiujare eksterlandajn prelegistojn.

Dum mia semajna restado en Budapeŝto mi havis okazon paroli en tri diversaj rondoj, i.a. "Konkordo", kies gvidanto estas Pál Balkanyi.

Estis por mi kiel Esperanto-instruistino speciala



Julio Baghy instruas.

travivaĵo ĉeesti la kurson de Julio Baghy en lia klubo kaj poste partopreni "Vivan gazeton" en la belegaj ĉambroj de la poŝtista kulturdomo. Vere viva gazeto, ĉar Baghy scias la arton ne nur instrui, sed ankaŭ paroligi la gekomencantojn. Kelkmonata esperantisto poste akompanis min tra la urbo. Mi unue kredis lin malnova esperantisto, sed tiaj rezultoj evidente ne estas unikaj inter la lernantoj de "Paĉjo". La plaĉa kunvenejo en la poŝtista domo estas preskaŭ malgranda internacia Esperanto-muzeo kun multaj esperantaĵoj sur la muroj krom bela biblioteko.

La fervojistaj esperantistoj en Budapeŝto meritas specialan mencion, ĉar eble estas la plej vigla rondo. Du kursojn de fervojistoj mi ĉeestis kaj grandan vesperon kun partopreno de proksimume 100 esperantistoj.



Gimnazianoj, flankitaj de

la direktoro Lajos Domokos

(dekstre), Maria Kenesei

kaj Pal Balkanyi (maldekstre).

Kompreneble invito al eksterlandano havas duoblan celon. La dua estas propagandi en ne-esperantistaj rondoj.

Tial estis aranĝita intervjuo kun mi en la Instruista Sindikato pri la dana lerneja sistemo kaj ankaŭ en Demokrata Virina Asocio. Hungara pedagogia ĵurnalo prezentis la intervjuon favore menciante, ke mi venis Hungarlandon per Esperanto. En Danlando almenaŭ dek ĵurnaloj menciis la vojaĝon, kelkaj eĉ sensacie!

Mia plej granda travivaĵo kiel instruistino estis renkontiĝi kun la hungara junularo en knabina gimnazio, kies direktoro estas Sinjoro Lajos Domokos. Dum 2 horoj mi instruis al 2 diversaj klasoj geografion pri Danlando per Esperanto montrante kolorlumbildojn pri mia lando kaj filmojn pri dana lerneja vivo. Lajos Domokos lerte tradukis. Speciala filmeto pri mia Kopenhaga Esperanto-eksperimento altiris grandan intereson inter la knabinoj, el kiuj kelkaj antaŭ jaro partoprenis libervolan Esperanto-kurson. Deputitaro de 3-a klaso, gvidata de sia klasinstruistino, petis pri ankoraŭ unu leciono. Tiu lasta — preskaŭ socia leciono — restas por mi la plej interesa. La hungaraj lernantinoj vere kuraĝis tre saĝe demandi ne nur pri la lastaj manieroj de la danaj "teenagers" (dekkelk-jarulinoj), sed ankaŭ pri pli gravaj problemoj de siaj danaj kamaradoj, pri edukeblecoj, libertempo, ktp. Ili ankaŭ multon rakontis pri la propraj problemoj. Montriĝis tiel, ke la problemoj de la junularo estas tre internaciaj. Interesa konferenco kun la hungaraj gekolegoj pri la vivcirkonstancoj de la pedagogoj en niaj du landoj finis la bone aranĝitan viziton.

Malgraŭ prelegoj kaj lerneja vizitoj restis tempo ankaŭ esti turisto iomete en la bela ĉefurbo de Hungarlando. Lerta ĉiĉerono estis la vicprezidan-



3. Vicprezidantino Maria Kenesei kaj ĝeneralsekretario Lajos Marton en la Esperanto-oficejo.

tino de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro, Maria Kenesei, kiu prizorgis min per preskaŭ patrina zorgemo.

Mi havis okazon kompari novajn kaj malnovajn loĝkvartalojn, vidi tute novtipan lerneja-konstruadon, kaj ĉar unu el miaj prelegoj temis pri restado en marĉa ŝlimbanejo en Neydharting, Aŭstrio, per Esperanto-stipendio, oni akompanis min al ne malpli ol 4 banejoj en unu tago! Budapeŝto ja estas la plej fama banejurbo de la mondo kun siaj multegaj varmaj fontoj.

Miaj gastigantoj en Budapeŝto ne nur regalis min per luksa manĝaĵo en luksa hotelo dum akompano de dolĉa cigana muziko, sed ankaŭ zorgis pri nutraĵo spirita: Du vizitoj en artgalerioj kaj bela teatra prezentado. Efektive, Budapeŝto vivas denove!

Roma Thorsen

Konstrufakulo de Unuiĝintaj Nacioj ricevis rekomendon pri la Internacia Lingvo en Svedlando

La subkomisiono de U.N. por konstruado de loĝejoj (Housing Committee and Economic Commission for Europe) vizitis la svedan urbon Örebro. La celo de la vojaĝo estas komuna studado, sub la aŭspicioj de Unuiĝintaj Nacioj, de la konstruaj manieroj kaj nivelo en Skandinavio.

La komisiono startis la 10.6.60 de Ĝenevo kaj faris studviziton en Oslo kaj Bergen (Norvegujo) kaj Helsinki (Finnlando). Post studado en Stokholmo kaj Örebro (Svedlando) la komisiono haltos en Kopenhago (Danlando) de kie oni reveturos al Svislando.

La komisiono kiu alvenis al Örebro reprezentis preskaŭ ĉiujn landojn de Eŭropo. La orienta parto havis reprezentantojn krom el Sovet-Unio ankaŭ el Hungarujo, Jugoslavio kaj Pollando. Kompreneble Usono havis siajn partoprenantojn kaj ankaŭ

Israelo sendis teknikistojn. Entute 18 nacioj estis reprezentitaj kaj por ĉi tiu grupo oni bezonis ok interpretistojn.

Ĉe la lunĉo kiun la Internacia Ytong-Kompanio regalis al la komisiono, kaj kiun ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de la urbaj aŭtoritatoj kaj la guberniestro de Örebro, oni disdonis la plurlingvan flugfolion de UEA destinitan por internaciaj kunvenoj. Direktoro Erik Carlén faris paroladon pri Esperanto kiel internacia lingvo, akcentante ke solvo de la lingva problemo per lokigo de nacia lingvo antaŭ la aliajn aŭ iĝos malsukceso aŭ signifos kulturan kaj lingvan imperialismon. La informo parolado estis tradukita tiel al la angla kiel al la germana, franca kaj rusa lingvoj.

T. Morariu



surprizitaj filmaj fakuloj taksis la verkon eksterordinare interesa, originala kaj alloga. Oni jam decidis pri ĝia realigo, sed pro certaj scenoj (vojaĝo de "Racianoj" el la kosmo, pereco de milionpopolaj urboj, de la planedo Tero kaj la homaro) kiuj ŝajnis esti tro multekostaj (kaj niaj jugoslaviaj filmentreprenoj estas ja ankoraŭ novaj kaj riĉas nek je mono, nek je teknikaj eblaĵoj) — oni ne daŭrigis la realigon de la filmo.

Sed niaj junaj astronomoj-esperantistoj tute ne rezignis pri sia originala ideo: pri traduko de ilia sukcesoplena libro "Tragedio en Universo" jam interesiĝas Danlando kaj Japanujo (la aŭtoroj tiuokaze rezignos pri aŭtora honorario por doni ĝin al la infanoj de Hiroŝima kaj Nagasaki, kies gepatroj estis la viktimoj de kruela kaj nehumana atombomba atako!) Se esperantistoj en aliaj landoj opinios valora traduki la libron (kaj en tiu okazo la junaj astronomoj-esperantistoj rezignos ĉe la unua eldono de la libro en nacian lingvon je aŭtoro honorario cele de disvastigo de Esperanto en la koncernaj landoj), certe tiam ie troviĝos iu filmentrepreno emanta realigi ja nekontesteblan kapitalon kuŝantan en la originala verko de niaj junaj astronomoj-esperantistoj.

Kaj tiam ni havos finfine la unuan veran Esperanto-filmon en la mondo!

*D-ro Gabriel Divjanoviĉ
direktoro de la Astronomia observatorio
(Jugoslavio, Zagreb, Opatička 22)*

(Serioza korespondado, celanta realigi iun el la suprepriparolataj aferoj, kun la tuta mondo dezirata! Se oni eventuale uzos la suprajn informojn pri la libro kaj filmo de la junaj astronomoj por la propagando en nacilingvaj gazetoj, ni afable petas sendi eltranĉaĵon al la supra adreso).

MALLONGA ENHAVO DE LA LIBRO "TRAGEDIO EN UNIVERSO"

La libro komenciĝas, anstataŭ per antaŭparolo, per la letero de junaj astronomoj al japana knabino Kuniko Kambara pri junulara kunlaboro rilatanta tutmondan junularan kaj homan amikecon kaj mondpacon.

I. Unua ĉapitro: "Enrigardo en la eternecon...."

En tiu ĉapitro la junaj astronomoj priskribas en originala scienca vizio la estinton kaj estonton de la planedo Tero en la universo. En tiu astronomia vizio la verkintoj sprite eluzas unu astronomian fenomenon ("precesio de ekvinoksoj") por rigardi la staton de la Tero antaŭ kelkaj "Platonaj jaroj" kaj post unu "Platona jaro" (kiu en kosmo enhavas 26.000 terajn jarojn).

El tiu astronomia vizio science kaj filozofie elmontriĝas la tuta senceco de la nuna stato sur la Tero kiel planedo en kosmo: homaro dividita je 100 ŝtatoj kaj popoloj, 3000 lingvoj, militoj kiel en sovaĝaj praepokoj k.t.p., k.t.p.

Per unu aparato la sciencisto de epoko post 26.000 jaroj metas antaŭ la okulojn de la nuntempa leganto de la libro karakterizajn kaj instruajn bildojn el la vivo de la nuna homaro — impresajn bildojn, plenajn de profunda

psikologia analizo, bildojn kiuj senevite meditigas ĉiun leganton.

Konkludo de la ĉapitro: nur scienco kaj homeco povas unuigi la homaron kaj savi ĝin el la nuna atomepoka krizo.

II. Dua ĉapitro: "Tragedio en Universo".

En tiu ĉapitro estas priskribita interesa astronomia vizio: saĝaj estaĵoj sur iu planedo en la universo (sinonanta simbolo "Racio") rigardas tra siaj teleskopoj la planedon Tero. Ili rimarkas iujn strangajn lumsignalojn venintajn al ili de sur nia Tero. La kosmaj loĝantoj konkludas ke sur nia Tero devas certe ekzisti raciaj estaĵoj kiuj volas, per tiuj signaloj, sciigi al la tuta kosmo sian ekzistadon kaj veni en kontakton kun ĉiuj raciaj estaĵoj en la universo.

La loĝantoj de la planedo "Racio" decidas viziti, per sia kosma ŝipo, la Teron kaj ĝiajn loĝantojn.

Sed, ho ve! Kiam ili venas al la planedo Tero, ili konvinkiĝas ke la signaloj, kiujn ili ricevis de sur nia planedo — estis hidrogena milito, kaj ne la alvoko de raciaj estaĵoj al aliaj estaĵoj de la kosmo! Tiuj signaloj signifis fakte — pereon de tuta mondo. La kosmaj vojaĝantoj trovas la Teron detruita, sen iu viva estaĵo. La tuta civilizacio kaj kulturo de mondo pereis en kosma kataklismo kiun kaŭzis la hidrogena milito!

Antaŭ la okuloj de la alvenintoj el la kosmo elstaras la terura vizio de pereco de l'mondo en hidrogenmilita kataklismo: pereas milionpopolaj urboj, milionoj da viroj, virinoj kaj senkulpaj infanoj en fajrego de hidrogenmilita ĥaoso. Sed ne pereas nur la homaj vivoj, pereas ankaŭ la verkoj de Platono, Mikelanĝelo, Tolstoj, Beethoven, Einstein, — pereas la tuta kulturo kaj civilizacio kiun la homa spirito kreadis dum jarcentoj.

Inter ĉiuj sciencaj kaj artaj atingoj de la tutpereinta homaro la alvenintojn el la kosmo plej kortuŝis la gesto de kvar homoj kiuj (en la jaro 1958-a), pro sia senlima amo al la homaro, estis pretaj oferi la propran vivon alŝipinte per sia eta ŝipeto ĝuste en la teritorion kie devis eksplodi hidrogena bombo — ili estas ja alŝipintaj por malebligi tiun nehumanan eksperimenton.

Al tiuj kvar homoj la alvenintoj el la kosmo konstruas eternan monumenton sur nia planedo kun surskribo:

"Al kvaroj kiu amis la homon!"

III. Tria ĉapitro: "Ni volas vivi!"

Dudek kvin junaj astronomoj faras kortuŝan apelon al la junularo de la tuta mondo, al ĉiuj bonaj kaj saĝaj homoj de nia planedo, por unuigi je unu nura homa tasko: savi la homaron per sia homamo kaj tutmonda homa solidareco.

MAGNETOFONA SERVO DE UEA

ĉe Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

Daŭrigo de la listo de la haveblaj sonbendoj (15.7.1960)

(Por programoj 1-82 vidu la jarlibron de U.E.A. 1960)

83 Prof. G. Waringhien: 'Honore al d-ro L. L. Zamenhof'.

(Prelego je la 15-12.1959 en la universitato de Parizo) 35 min.

84 D-ro E. James Lieberman: 'Interview with John Lewine'. (Anglalingva intervjuo pri Esperanto, en kiu prezidinto de ELNA respondas ofte aŭditajn demandojn.) 20 min. (19)

85 D-ro E. James Lieberman: 'L. L. Zamenhof: Dr. Esperanto.' (Anglalingva artikolo pri Zamenhof, kiu aperis en 'New England Journal of Medicine' n-ro 261, 1959, legata de la aŭtoro) 15 min. (19)

86 S-ro Eizo Ito raportas pri sia mondvojaĝo kaj Japanujo. (Surbendigita en la Esperanto Domo, Oakville, Kanado, majo 1960) 120 min. (20)

87 Islanda programo preparita kaj surbendigita de la esperantista societo 'Aŭroro' en Reykjavik, Islando. (Pri islanda historio, muziko kaj literaturo) 180 min.

Esperanto en Krakovaj Liceoj kaj Universitato

por plenaĝuloj

Same kiel en la pasinta jaro 1958/59, ankaŭ ĉijare mi gvidis kelkajn tutjarajn kursojn en la II-a kaj VII-a liceoj, sed en aliaj klasoj, kiuj ĝis nun ne lernis Esperanton. Ĉar la VII-a virina liceo okupis nun la unuan lokon ĉefe pro ĉiama zorgado de tiea geinstruistaro, mi donas ĉi-tie mallongan raporton pri rezultoj de ĉi tiu instruado. Mi devas rememorigi, ke ĉe la lernejo ekzistis "Metodika Centro de Esperanta Instruado" kaj 8 personoj el la geinstruistaro partoprenis specialan kurson de la Esperanta lingvo kaj sukcese trapasis la ekzamenon el materialo de "Supera Kurso".

Ĉijare mi gvidis Esperantan kurson en du grupoj (kl. IXe kaj kl. IXd+Xb) kaj mag. Józef Dudzinski gvidis la saman kurson en la tria grupo (kl. IXa). Entute enskribiĝis al Esperanto en la komenco de la lerneja jaro — 107 lernantinoj, meznombro partoprenis la kurson dufoje en la semajno (6-a kaj 7-a lecionoj) — 65 kaj al ekzameno anoncis sin 45 lernantinoj. Sur la bazo de skriba kaj buŝa ekzamenoj en ĉeesto de vicedirektoro mag. Józef Łomnicki — 25 lernantinoj, 55%, ricevis sur la atestoj "tre bonan" noton, 15 lernantinoj, 33%, "bonan" kaj apenaŭ 5, 12%, la noton "sufiĉa".

Sabate, la 18-an de junio en la 6-a leciono okazis solena disdono de la atestoj kaj premioj por la plej diligentaj lernantinoj. Krom 14 libropremioj (Ziółkowska — Dr Esperanto) ĉiuj lernantinoj ricevis de nia filio ilustritan gvidlibreton tra Krakovo de Schoenborn "Ni vizitu la urbon Kraków" kaj polan kongresan gazeton "Esperanto Lingvo Internacia" el la jaro 1958.

En aŭlo bele ornamita per floroj kaj Esperanta flago parolis Esperantlingve direktorino Mag. Julia Rozycka, dankante al kursgvidantoj por la tutjara laboro kaj tre bonaj rezultoj. Unu el la profesoroj de fremdaj lingvoj Mag. Wiktor Podkowka parolis samlingve en la nomo de siaj gekolegoj, kiuj ĉijare ankaŭ esperantiĝis post trapaso de ekzameno el

"Supera Kurso", kaj ili estas preskaŭ kapablaj instrui Esperanton en ĉi tiu lernejo. En la nomo de 4 klasoj parolis du lernantinoj ankaŭ esperantlingve, enmanigante al mi, kiel la antaŭa parolinto, belajn florojn kaj sukeraĵojn. Parolis ankaŭ entuziasmigita prof. Malina Krajska, kiu estis iniciatinto de ĉiuj kursoj en la lernejo kaj kiu jam plenumis la "praktikan" ekzamenon. Por ĉiuj lernantinoj la solenaĵo, dum kiu mi ankaŭ parolis dankante por donacoj, estis bela kaj impresa travivaĵo. Post la solenaĵo okazis sur la korto de la lernejo komuna fotografado, kies reproduktaĵon mi ĉisube prezentas.

Parolante pri lernejaj kursoj, mi ne povas prisi-lenti du 4-monatajn kursojn (elem. kaj sup.) por plenaĝuloj, kiuj okazis en "Kopernik"-salono de Jagiellona Universitato. Al la ekzamenoj anoncis sin 125 personoj, inter ili 30 personoj el la geinstruistaro. London la 20.VI. okazis ankaŭ solena disdono de atestoj, paroladoj kaj ni ricevis florojn kaj donacojn i.a. tre volaran verkon pri "Eŭropaj artpentraĵoj en polaj kolektoj". Tiel entuziasmiĝis por Esperanto kaj ĝia granda IDEO krakovaj plenaĝuloj.

Nun kiam komenciĝis en la tuta mondo granda kampanjo por enkonduki Esperanton en lernejojn de multaj landoj, ĉi tiu fakto estas speciale grava kaj ĝojiga. Depost la nova lerneja jaro Esperanto estos devige instruata en kelkaj krakovaj lernejoj: II-a kaj VII-a liceoj, unu teknika kaj unu popol-lernejo kaj en kelkaj altlernejoj. Krom lektorato kiu funkcias en Jagiellona Universitato depost la jaro 1946, estos daŭrigata lektorato en "Supera Pedagogia Altlernejo" kaj nova lektorato en "Supera Ekonomia Altlernejo" dank al tre favora por Esperanto dekanato de la lernejo, D-ro Wiktor Boniecki.

Unu el miaj gekursanoj el "Supera Kurso", diris en sia paroladeto i.a. : "Ni promesas servi fidele al la nobla IDEO de Esperanto, kiu estas voĉo de estonteca lingvo de la nova mondo, lingvo de la tutmonda interkompreniĝo. Ni estas feliĉaj kaj fieraj, ke ni estas homoj de l' progreso, kiuj plantas la Kulturon kaj laboras por la Paco, frateco kaj harmonio inter la popoloj en la tuta mondo sub la verda standardo.



Prof. Mieczysław Sygnarski
lektoro de Esp. en Jag. Univ.

Tra la Mondo

Bulgarujo

La esperantista INTERNACIA KLUBO en la gimnazio Polski Trambes, Tarnovsko, organizos en novembro "Feston de la Popoloj". Tre volonte la klubo por tiu celo akceptos ĝis fino de oktobro: popolkantojn, bildojn de popolkostumoj, historiaj monumentoj, popoldancoj kaj kutimoj, geografiajn kartojn k.s., por ke la aranĝo havu veran sukceson.

Dum la 34-a kongreso de la bulgaraj

esperantistoj en Tarnovo (9-12/VI 1960) en la salono de la loka Ŝtata Teatro, La Bulgara Esperanto-Teatro (BET) prezentis en Esperanto "Komedio de Eraroj" de Ŝekspiro en verstraduko de William Auld kaj Asen Simeonov. La enscenigo estis realigita per tre modernaj dekoracioj kaj stilaj luksaj kostumoj de la ŝekspira epoko.

La bildo montras la geaktorojn dum la prezentado de "Komedio de Eraroj".



Danlando

La dana asocio "Foreningen for Forenede Nationer" (t.e. Asocio por Unuiĝintaj Nacioj), kiu havas 5000 individuajn membrojn en 100 rondoj, fariĝis kolektiva membro de Centra Dana Esperanto-Ligo. Samtempe CDEL fariĝis kolektiva membro de la nomita asocio. Oni atendas intiman kunlaboron inter la du unuiĝoj: Ili ekz. intencas interŝanĝi la adresojn pri siaj lokaj kluboj kaj prelegantojn, kaj estas la intenco, ke la lokaj Esperanto-kluboj invitu la anojn de la lokaj UN-rondoj al la kursoj stariĝotaj ĉi-aŭtune. La membrogazetoj de la du organizaĵoj interŝanĝos artikolojn kaj anoncojn pri la aktivecoj unu de la alia kaj disponigos unu al la alia siajn kliŝojn.

La iniciato de CDEL estas tre salutinda, kaj estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj landaj asocioj agu simile. Ili bonvolu esplori la eblecojn tiurilatajn en siaj landoj.

Francujo

Dum la lernojaro 1959-60 regulaj Esperanto-kursoj okazis en 12 instruist(in)aj seminarioj: Aix-en-Provence (2), Arras (1), Bourges (1), Caudéran-Bordeaux (1), Caen (2), Montpellier (1), Perpignan (2), St. Brieuc (2).

En Aix-en-Provence kaj Perpignan,

la kursoj estis devigaj por la gelerntoj de la unua klaso, aliloke nedevigaj. Entute ĉirkaŭ 200 gelernantoj (estontaj geinstruistoj) vizitis la kursojn, po unu horo semajne.

Tiuj kuraĝigaj atingajoj instigas al plua klopodado en la seminariaj medioj, kaj oni esperas por 1960-1961 je novaj kursoj en aliaj porinstruistaj lernejoj.

Fine de majo 1960 okazis en la Instruistina Seminario de Bourges (Cher) esperantista vespero "Nov-Zelando". La Esperanto-klaso kun ĉeesto de kelkaj lokaj esperantistoj partoprenis.

Germanujo

La 38-a Germana Esperanto-Kongreso dum Pentekosto en Berlino kunigis pli ol 300 esperantistojn el eksterlando kaj el orienta kaj okcidenta Germanujo. La kongreson salutis S-ro Senatoro Kurt Exner, kaj S-ro Hans Jakob el Genevo faris la festparoladon.


La 17-an de julio ĉijare okazis la unua postmilita renkonto inter esperantistoj de la iamaj diversaj Esperanto-Organizaĵoj en Berlino.

Hungarujo

En 1961 okazos en Budapeŝto Internacia Filatelio Ekspozicio, kaj la Asocio de Hungaraj Filatelistoj, Buda-

pest VI, Nĕpköztársaság u.3. petas vin proponi ekspozici-materialon.

Italujo



La Olimpia Glacistadiono, kie okazis spektaklo honore al la kongresanoj dum la 31-a Itala Kongreso de Esperanto. Samtempe oni festis la 50-an datrevenon de la starigo de la itala Esperanto-movado. La kongreso okazis en Cortina d' Ampezzo de la 10-a ĝis la 16-a de septembro 1960.

Kanado

Sub la nomo VOĈO DE VIRINOJ fondiĝis la 28-an de julio 1960 en Toronto Virina Movado, kiu celas fariĝi tutmonda kaj ankaŭ intencas praktike apliki Esperanton por plifaciligi internacian kontakton. Oni petas esperantistinojn en diversaj landoj fari sian eblon por fondi similajn asociojn. Ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: Voĉo de Virinoj, P.O. Box 88, Port Credit, Ontario, Kanado.



En la kanada universitato Mc Master en Hamiltono, Ontario, oni je la unua fojo anoncis kurson en la Internacia Lingvo. La kurson gvidos la Vicprezidentino de Kanada Esperanto-Asocio, S-ino Vilma Eichholz.

Usono

La foto prezentas de dekstre: S-ro instruisto Julio Mazariegos el Gvatemalo, kiu vojaĝis tra Usono helpe de Esperanto, ne scipovante la anglan lingvon. La rezulto estas: enkonduko de Esperanto en vespera lernejo en University City, la plej granda antaŭurbo de St. Louis. S-ino instruistino Marguerite Slack, kiu fondis kaj gvidas Esp-klubon ĉe la Senior High School tie, kaj S-ro George Falgier, kiu instruis en la somera lernejo kaj instruas en vespera lernejo.



Ne ricevi, sed doni

"Ni ne estas membroj de U.E.A. por ion ricevi, sed unue ni estas membroj de U.E.A. por ion doni". Jen la vortoj de la Ĝenerala Sekretario de U.E.A., Prof. Ivo Lapenna, en la Ferma Kunsido de la Brusela Kongreso, kiam li anoncis la altigon de la kotizoj kaj — aplaŭdis la kongresanoj, ĉar ili komprenis la veron de tiuj vortoj kaj aliflanke estis konsciaj ke, malgraŭ tio, eksterordinare multe ili ricevas de U.E.A.

Se oni konsideras la hodiaŭan amplekson de la revuo Esperanto kaj de la Jarlibro kaj se oni pri-pensas la ĉiuspecajn aktivecojn, kiujn entreprenas la Asocio, ĉiu devas vidi ke ankaŭ la novaj kotizoj estas ankoraŭ ege mal-altaj. Oni nur komparu ilin kun kotizoj kiujn oni en propra lando pagas por sia faka organizaĵo aŭ por iu ajn kultura unuiĝo, kiu eldonas gazeton kaj entreprenas iujn agadojn — kaj eble ne eldonas jarlibron — por konvinkiĝi pri tio.

Aliflanke, U.E.A. bone scias ke por pluraj membroj, precipe en kelkaj landoj kie la salajroj ne estas tre altaj, ankaŭ tiuj ĉi modestaj kotizoj estas ankoraŭ tre altaj. Tial estis kun sentoj de bedaŭro por tiuj membroj ke la Komitato faris tiun ĉi decidon, al kiu ĝi estis absolute devigita pro la ĉiam plialtiĝantaj prezoj ĉie en la mondo. La Komitato kaj Estraro forte apelacias al tiuj membroj ĉiel klopodi por resti membroj ankaŭ nun. Same forte ĝi apelacias al tiu granda kategorio de membroj, por kiuj la sumo de 15.— gld. aŭ ĝia egal-valoru ne senteble premas la jaran buĝeton. Al tiuj membroj la Asocio tute aparte apelacias ne nur por ke ili mem restu membroj en kiel eble plej alta kategorio, sed ankaŭ, por ke ili per adopto kaj subteno helpu siajn malpli feliĉajn amikojn.

Kaj ne nur por konservi la malnovajn membrojn la Asocio alvokas ĉiujn legantojn. Ni, la gvidaj instancoj de la Asocio kaj

vi, la membroj, havas ankaŭ la komunan taskon allogi ĉiam pli multajn novajn anojn al la Asocio. Ni faros tion, donante ĉiam pli bonkvalitan revuon kaj pli valoran Jarlibron kaj plenumante kiel eble plej efike ĉiujn entreprenatajn agadojn. Vi tion faru larĝe diskonigante inter la esperantista publiko — kaj granda estas ankoraŭ tiu publiko

ekster la vicoj de U.E.A. — la Asocion, ĝiajn farojn, ĝiajn eldonaĵojn kaj varbante tiel novajn membrojn. Kaj, ĉar vi kaj ni kune estas nur NI, la Asocio, kies celo estas la plej larĝa disvastigo de Esperanto, ni do ĉiuj kune energie, en konkordo kaj solidareco streĉu niajn fortojn. Por ricevi, jes, sed multe pli por doni.

M. H. V.

LA NOVAJ KOTIZOJ 1961


Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Ab.	Valuto
Argentino	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Aŭstralio	19/—	38/—	57/—	380/—	202/—	28/6	aŭs.ŝil.
Aŭstrujo	54.—	108.—	162.—	1080.—	550.—	81.—	Sch.
Belgujo	100.—	200.—	300.—	2000.—	1100.—	160.—	b.fr.
Brazilo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Britujo	15/—	30/—	45/—	300/—	160/—	22/6	ŝil.
Bulgarujo	7.50	15.—	22.50	150.—		11.50	n.gld.
Ĉeĥosl.	7.50	15.—	22.50	150.—		11.50	n.gld.
Danlando	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22.50	d.kr.
Finnlando	690.—	1380.—	2070.—	13800.—	7360.—	1060.—	f.mk.
Francujo	10.—	20.—	30.—	200.—	106.—	15.50	N.F.
Germanujo	9.—	18.—	27.—	180.—	90.—	14.—	g.mk.
Hispanujo	120.—	240.—	360.—	2400.—	1200.—	180.—	pes.
Islando	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Israelo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Italujo	1350.—	2700.—	4050.—	27000.—	16000.—	2040.—	liroj
Japanujo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Jugoslavio	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Kanado	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Kubo	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Maroko	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Nederlando	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Norvegujo	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22.50	n.kr.
N. Zelando	15/—	30/—	45/—	300/—	160/—	22/6	ang.ŝil.
Pollando	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Portugalujo	60.—	120.—	180.—	1200.—	640.—	90.—	esk.
S. Afriko	15/—	30/—	45/—	300/—	160/—	22/6	ang.ŝil.
Svedujo	11.—	22.—	33.—	220.—	110.—	16.50	sv.kr.
Svislando	9.—	18.—	27.—	180.—	90.—	14.—	sv.fr.
Urugvajo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Usono	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Venezuelo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Aliaj landoj	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.

Klarigo de la tabelo : En la kolumno "Jarl." estas indikita la prezo de tutpaĝa reklamo en la Jarlibro. Duonpaĝa kaj kvaronpaĝa kostas resp. duonon kaj kvaronon de la menciita sumo. Ĉiu energie varbu reklamojn !

En la kolumno "Ab." troviĝas la abonprezo de la revuo "Esperanto", sen membreco kaj sen Jarlibro.

Junuloj ĝis 21-jaraĝaj pagas nur la duonon de la indikitaj kotizoj por Membro-Jarlibro (MJ) kaj Membro-Abonanto (MA).

La kotizo por Dumviva Membreco (ne indikita) estas la 20-oblo de la kotizo MA. Estas ege favore fariĝi Dumviva Membro ankoraŭ antaŭ la jarfino, ĉar ĝis tiam oni pagos laŭ la malnova tarifo !



LA JUNA VIVO

"Sudamerikaj Problemoj"

Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Oldenburg/Oldb.

Kiel en la pasintaj jaroj ni aranĝos inter Kristnasko kaj Novjaro nian tradician Seminarion, al kiu ni kore invitas niajn eksterlandajn geamikojn. Jen la unuaj informoj:

Loko: Junulargastejo de Oldenburg/Oldb., situanta en nordokcidenta Germanujo proksime al Bremen.

Tempo: De la 26-a de decembro 1960 ĝis la 1-a de januaro 1961; la malfermo okazos la 26-an de decembro vespere, la fermo la 1-an de januaro tagmeze.

Programo: Ĉefa temaro estos "Sudamerikaj Problemoj" pritraktataj per prelegoj kaj sonbendaj raportoj el Sudameriko; krome okazos film- kaj lumbildprezentadoj, diskutoj pri la esperantista junularo, surbendigo de raportoj pri la Seminario, ekskursoj kaj silvestra balo.

Prezo: Pro ŝtata subvencio la prezo (enhavanta loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estos nur 40.— GM por gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj kaj 50.— GM por pli ol 25-jaraj. Parto de la vojaĝkostoj (ĝenerale 50%) sur la linioj de la Germana Federacia Fervojo estos repagita al la gepartoprenantoj malpli ol 25-jaraj.

Aliĝo: Ĝis la 1-a de decembro 1960 al Germana Esperanto-Junularo, T 6/18, Mannheim, Germanujo, kun indikoj pri nomo, antaŭnomo, preciza adreso, naskiĝdato kaj profesio. Por plifaciligi nian organizan laboron, bonvolu aliĝi kiel eble plej baldaŭ.

*Koran bonvenon en Oldenburg/Oldb!
Germana Esperanto-Junularo
Federacia Estraro*

Korekto

La rolon de Guascogna en "Kurioza Okazaĵo" ne ludis Slobodan Stojanović, sed Emil Glad, aktoro de la Zagreba Drama Teatro.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiutage	15.30-16.00	Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso. Warszawa, 249m. (1205 kcs), 42.11m, 31.50m, 31.45m, 31.01m, 25.42m, 25.16m, 25.09m. P. Pola Radio, ul. Noakowskiego 24, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	10.50-11.00	Natal, 236m. (1270 kcs), 60.79 m. K. Radio Poti, Av. Deodoro 245, Natal, Brazilo.
	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. (1520 kcs). K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 41.35m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 41.35m, 39.11m, 30.93m. P.
	23.35-23.55	Bilbao, 265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo varia dum unuhora diverslingva programo).
	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 92.30m, 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 277-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
Lundo	00.45-01.00	Juiz de Fora, 60.91m. I.P. Rádio Industrial, Rua Batista de Oliveira, 745, Juiz de Fora (Minas Gerais), Brazilo.
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m. (1285 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 402m. (746 kcs) P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	02.00-02.30	Caracas, 476 m. (630 kcs), 48.62 m. P. Radiodifusora Nacional, Caracas (Venezuelo).
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, P. (D-ro Baur).
	16.40-16.50	Wien. 513m. (584 kcs), 293m., (1025 kcs), 48m., 41m., 30m., 25m., 16m., 11m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	23.00-23.15	Guatemala, 470m. (640 kcs), 48.54m, 30.98m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, Mezameriko.
Ĵaŭdo	08.30-08.40	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs). K. Esperanto-Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat).
	22.00-22.15	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	São Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso, São Paulo, Brazilo.
Vendredo	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	20.00-20.15	Vigo, 277m. (1082 kcs). K. La Voz de Vigo, Vigo, Hispanujo.
	22.00-22.10	Hilversum 298m (1007 kcs). I., V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Sabato	12.45-13.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs) 31.42 m., K.I. Radio Roquete Pinto, Av. Erasmo Braga 118, Rio de Janeiro, Brazilo.
	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (700 kcs), 50.08m, 30.71m, 25.10m, 16.78 m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 4-X, Tra la literaturo; 7-X, Historia-arta ekspozicio pri la sporto en Romo; 11-X, Leterkesto kaj bibliografio; 14-X, Sankta Tereza el Avila; 18-X, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-X, Novaĵoj el Italujo; 25-X, Itala verkisto Massimo Bontempelli; 28-X, Itala turisma urbo Taormina. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto.

Brazila Radio. En Aŭgusto 1960 fariĝis kvinjara la programo "Esperanto, lingua internacional" prezentata ĉiusabate de Radio Ministerio de Edukado kaj Kulturo en Rio de Janeiro. La programo daŭre prezentas kronikon, librajn recenzojn, literaturaĵon, informojn kaj intervjuojn, krom Esperanto-kursojn. Nuntempe estas disaŭdigata la kvina elementa kurso, al kiu enskribiĝis granda nombro da aŭskultantoj.

Alia Brazila stacio, Radio Copacabana, komencis la 29-an de Majo serion da programoj ĉiudimanĉaj.

Pola Radio daŭre elsendas ĉiutage dum duona horo laŭ la jena programo: Lunde, felietono pri politika, socia, ekonomia, kultura, scienca, ofte priesperanta temo; Marde, prezentado de Polaj muziko kaj muzikistoj; (ĉiun unuan mardon de monato, anguleto por blindaj esperantistoj); Merkrede, kultura kroniko kaj daŭriĝo p. 179

Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

STUPOJ SEN NOMO* de Baldur Ragnarsson. *Prologo de J. Régulo Pérez. Dekoracioj de Pablo Picasso. Kovrilo de John Hartley. Vinjeto de Mads Stage. Stafeto: Beletraj Kajeroj 1. 19 x 12 cm. 128 paĝoj. Prezo: 4.— gld.; 16 steloj.*

El Islando, kie esperantisto trovas sin pli sola ol eĉ en aliaj eŭropaj landoj; kie malpli dika tavolo de teknologio kaj pseŭdocivilizo protektas la sensojn kaj koron kontraŭ la beleco kaj minaco de la nehoma kosmo; kie la pejzaĝoj estas nudaj, drastaj kaj ofte similaj al la terursonĝoj de alilandaj artistoj, nun venas libreto kiu kelkloke ŝiras kiel norda vento, kiu impresas forte kaj kiu maltrankviligas la menson.

Sed, en la nuna mondo, la menso ne rajtas postuli trankvilecon kaj la koro ne evitos ŝiriĝon: se kelkloke la klinke drastaj poemoj de Baldur Ragnarsson sangigas la trafiton, oni rememoru, ke kadavroj ne sangas. Ragnarsson, plenkonscia pri nia mortemo kaj pri nia nuna kapablo mortigi la mondon, atentigas nin pri nia vivanteco, pri respondeco kaj pri ia supera valideco de amo kaj intelekto. Li bele ekzempligas tiun faman diron de *Pascal*, ke la homo estas nur pensanta fragmito — sed kiam la universo mortigas lin, la homo restas pli granda ol la tuta universo, ĉar la homo scias ke li mortas. Ni ŝuldas dankon al Ragnarsson, ĉar li memorigas nin pri la grandeco de la homo.

Tion li faras, ne nur per la enhavo de siaj profundaj, pensigaj poemoj, sed ankaŭ per ilia estetika beleco: tre videble li estas artisto serioza, dediĉita. *Koncentriĝo*, diris la usona-brita imagista skolo, kiu siatempe multe forbalais tedajn banalecojn el la angla poezio kaj preparis la vojon por novaj kremetodoj, *estas la esenca eco de la poezio*. Se oni opinias, kiel mi, ke tiu ĉi frazo esprimas gravan preskaŭveraĵon, oni trovos, kiel mi, intensegan estetikajn plezuron (kelkfoje eĉ korpe tremigan aŭ korbatiĝan) ĉe la poemoj de Ragnarsson.

La libro konsistas el tri ŝtupoj; antaŭ ĉiu ŝtupo la tremanta koro ricevas stimulan injekcion: desegnon infanstilan de Picasso, kiu memorigas nin pri la konsterna vizikapablo de kelkaj infanaj psikoj, pri la miranta infano

kiu restas en la artista psiko. (La redaktoro ja meritas gratulon, ĉar li kaperis tiajn raraĵojn por la esperantistoj).

La unua "ŝtupo" enhavas dudek-du poemojn, inter kiuj troviĝas nenio banala, enua aŭ neartistma, kaj kelkaj poemoj miaopinie perfektaj. Ragnarsson verŝajne multe influigis per du temoj de la nuntempa scienco: spacovojaĝado kaj nukleaj armiloj. Laŭ mia gusto, unu el la plej belaj poemoj en la libro estas la soneto: "De Ter' sendita penta esplorist'" pri la spacovojaĝanto, kiu neniam atingas planedon sufiĉe frue, por malhelpi la krucumadon de la tiea Kristo. Kolosa koncepto, bildigita per vortoj ege potencaj. Kaj en la vizia poemo:

*"Finosortas
sur la Tero,
fajro krakas,
tondras fero . . ."*

Ragnarsson laŭ la martelanta ritmo de la *Dies Irae* memorigas nin pri nia ebla tuthomara memmortigo. Jen unu el liaj neforgeseblaj bildoj:

*"Ludon lasis
l'infaneto,
solas pilkoj
sen priĵeto."*

Tiu tenere kortuŝa sugestia bildo pri la morto de infanoj ankaŭ ironie sugestias la "pilkojn" kiujn tielnomite "maturaj" homoj kapablas tiel facilanime ĵeti la nukleajn bombojn.

Mi ne nomus Ragnarsson pesimisma; li estas nur realisma. Li ŝajnas iom obsedita per nia mortemo; sed en mortigema mondo; kaj nenies vivkoncepto povas esti plenkura, ĝis li plenkonscias pri la morto. Inter la poemoj de la Unua Ŝtupo, ni vidas, ke homa amo estas ne nur la konsolo:

*"La solan sankton for de
l'mondorgi'
mi trovas en brakum'
de sola Si."*

sed ankaŭ la granda esperigilo kaj edukilo:

*"Ekruĝas mia vango,
se krudas ago via,
sed fidon mi ne perdas
pri mondo familia,
ĉar legas mi konsole
en la okuloj puraj
de mia filo kara
pri ecoj dinaturaj."*

"Rilatoj vir-virinaj tial estas ĝermo de nova superaĵo de ĉiel' malfermo" kvankam la homoj pli ol la bestoj kapablas suferi pro amo. Kun fileto antaŭ la kovejo — en unu el la plej belaj poemoj de la volumo — Ragnarsson trovas la tutecon kaj unuecon de la vivo:

*"Lanuge mola nia kokinido
la tagon strabas en fiera fido:
en mi la Kosmo sin spegulas
certe,
en mia esto tuta mondvalido."*

La poemoj de la Dua Ŝtupo ne havas la saman tuje sensofrapan belecon; feliĉo malĉeestas; sango, nigro kaj krueleco eĉ pli konstante regas; kaj multaj el la poemoj estas malpli rapide kompreneblaj. Sed pliprofundigas la intenseco de la artismo. Kian neforgeseblan bildon donas nova poemo pri nuklea mondogo, kiam la poeto bildigas mortantojn, kies lastaj rigardoj ironie trafas la planedon, Venuŝon! Tre konciza estas la simbolo, sen gloso, sen banaliga substreko; sed, unufoje plenkaptite per la menso, tiu ĉi simbolo resumas la tutan tragedion de la homa historio.

La homo estas krucumita per la "isma devo" — du vortoj resumas la tutan kruelecon de ideologioj. La neĝo povas "cigni krudosubon".

*"Treme, sur mensofundo
sub splenoblok' atendas
en mutokrampoj la poem."*

Tiaj koncizaĵoj tre plaĉas per sia trafeco. La terursonĝo (p. 68), la cel-sopirado (p. 70), la subita percepto pri mortemo dum malagrabla promeno (p. 73), la misteraj ironioj de niaj lacecoj inter farendaj taskoj (p. 74), la senkoherigo de pasio (p. 83) simile ekzempligas tiun animoskuan intensecon, kiu karakterizas la poemojn de Ragnarsson. Li mem kelkfoje sentis la tenton eviti veran pensadon, travivadon de siaj propraj vizioj:

*"Timas antaŭ fremdo mi,
precipe nigroduma,
tiri min al ŝirma lok'
ja tiam tentas plej . . ."*

sed li scias, ke la ĝisfunda esplorado de sia mallumo povas esti vojo al saĝo:

*"Ĉar sombrokisoj tiaj
kaj voĉo fride fantoma,
estas limogardistoj
de regno eksterhoma."*

En la plej "malfacilaj" poemoj, oni rimarkos oftege tiun talenton pri la belege trafa kaj konciza frazeto, tiun perfektecon el intenseco forĝitan, kiu estas tiel elstare karakteriza de la poeto: li vidas:

*"flugilrompitan sunon
trakuri arde super la tegmento,
eskapi rande mian fumotubon
kaj fali maron"*

"Sur mensa Gibraltaro
enua estas mia gardostaro".

"luno silenta
kiu kalvakape fendis
plumaron de l'nuboj"

"palpoj krepuskaj
de orfa pensaro . . ."

"Al la trafiko de mia sango
tra l'oscedaj vejnoj
mankas ruĝaj lumoj."

"De mia koro
ĝis mia cerbo
senvoja spac'."

La lasta poemo impresas kiel nigre
pesimisma; sed la lastaj vortoj de tiu
ĉi malgranda unua volumo estas

"sen fino"

— sen punkto. Se nunmomente la tri
ŝtupoj de Ragnarsson kondukas nin
nur al la rando de abismo, ni ne for-
gesu, ke tiu relative juna artisto an-

koraŭ ne finkonstruis sian ŝtuparon.
Vera talento ĉiam anagramas *latento*;
kaj mi atendas, ke tiu ĉi iom izolita,
tre individueca Esperanta verkisto el
fora Islando (fora de ĉiuj . . .) iam
iĝos avangardisto je la plej alta senco:
li antaŭen kaj supren kondukos mul-
tajn el ni, estetike kaj pense. Li jam
purigis sin de ripetemo, imitemo, ba-
naleco, flatemo al la publiko. Mi, kiu
tro bone scias, kiel malfacile estas
venki tiajn tentojn, sentas fortan fi-
don, ke Ragnarsson la homo baldaŭ
trovos la artistan plenumon de sia jam
videbla humaneco kaj reala progrese-
mo; ke Ragnarsson la artisto jam
brulpurigis por si mem vastan kam-
pon, sur kiu iam aperos riĉega rikolto.

Dume, ni aĉetu lian unuan volumon,
ekstere belan kiel ĉiuj *Stafeto*-pre-
sitaĵoj; ĝi jam estas trezoro tragika,
kaj neforgeseble montras la potencon
kaj plastikecon de nia lingvo.

MARJORIE BOULTON

Novaj Broŝuroj

La trafikoficejo en Berlino eldonis
faldfolion "Berlino de hodiaŭ", kiu
estas havebla ĉe: La Trafikoficejo,
Berlin 82, Berlin-Charlottenborg
Fasanenstr. 7/8, Germanujo.



La SYNDICAT D'INITIATIVE,
Korto de la Klostro, eldonis belan
faldfolion pri la Muzeo en Vienne en
Delfinio, Francujo.



En diversaj lingvoj — ankaŭ en
Esperanto — La Norvega Trafikoficejo
eldonis multkoloran vojaĝmapeton:
"Al Danlando kaj la Kontinento". Ĝi
estas havebla ĉe: A/S Larvik-Frede-
rikshavnferjen, P.O. Box 2443, Oslo

Belartaj Konkursoj 1960

Sekcio: Originala poezio

Unua premio

ROMANCO F-MAJORA DE BEETHOVEN

*La majvesper' al ĝi kulisas...
En mia ĉambro nigriĝanta
viziti venas min plej granda
el majstroj kaj la belo glisas
tra vespera hor'.*

*La arĉ' kantigas violonon
rakonti pri sopir' tenera
kaj trafas ĝia sorĉ' konkera
eĉ vin, trinkanta artodonon
ho soifa kor'.*

*Sur plankon de malhela ĉambro
transcenda mano ĵetis rozon,
mi aŭskultante virtuozon
flaras, ke bonodoras ambro,
spiras roza flor'.*

*La strata lampo pentras ombre
sur ĉambra vando bildojn strangajn,
mens' mia flustras vortojn dankajn
al muta mask' pendanta sombre
en titana glori'.*

Jiří Kořínek, Brno, Ĉeĥoslovakio

Dua premio

AL ALTAJ TATROJ

El ebenajo altiĝantaj ŝtonmirakloj:
vin sube ĉirkaŭringas akvoj, supre agloj.

Per pintoj kiel fiŝojn kaptas vi la nubojn.
Tre ofte, dissterninte la nebulojupojn
trompŝercas, ŝajnigante, ke vi ne ekzistas.
Tuj poste, forĵetinte ilin, vi ne plu rezistas
al homrigard', nudecon vian avidanta . . .
Nur venu, venu, ho amanto diletanta:
elektu mortospecon, ardan rekompenccon
pro amotuŝoj! . . . Ne toleros ĉi atenccon
Vestaloj vi fieraj de jarmilionoj,
smeralde mar-okulaj log-medalionoj!

Vir' en Giganta Akvofal' sin volis duŝi?
bonvolis vi kompleze lin sub rok' on puŝi:
li eterniĝis kun okuloj mirigitaj;
ili sur fotoj eĉ nun brilas morton spitaj . . .
Eksentas vi junulon vant' kaj blasfeman?
deskrapos lin: formikon rampe konkereman;
lavange superŝutos per granitkitelo
kaj zorge kovros per ermena neĝmantelo.
Ĉar dum piedoj viaj dancas en sunlumo.
hararoj viaj? — vip' de ŝtormo-frenezumo!!!

Vin plugas glaciejoj, trempas pluvundoj,
bruligas sunofrapoj, fendas frostovundoj
jam de pratempo. Tamen ĉiam des pli belaj
eĉ sen haŭteroj vi fariĝas. Nur ribelaj
vi restas. Sed jam ĉesis via monopolito:
salutojn kaj minacojn sendi al la Foro!
/Floraro, faŭno per instinkt' sin tenas vive
pereus Hom', kredante al instinkt' naive:
science ekipita viajn sorĉojn kribras;
palpiloj liaj jam en Universo vibras! /

Sed nin ne timu: feblajn mortokandidatojn
indulgu nin, renversu la kondamnajn fatojn.
Ne volu nin vi per sovaĝa venĝo buĉi:
el molaj mamoj lasu novan vivon suĉi!!
Al plena resaniĝo donu sunan gracon
kaj al popoloj niaj — poreternan pacon!!! . . .

Ludoviko Izák, Martin, Ĉeĥoslovakio.

S-ro Ferenc Illes, la fondinto kaj prezidanto de Poŝtista Esperanto-Fakrondo, mortis en sia 62-a jaro en Budapeŝto. Li dum jardekoj estis fide-la, agema membro de la movado.

koncerto kun bondeziroj; Jaŭde, komentario pri aktualaj temoj kaj leterkesto; Vendrede, literatura rubriko; Sabate, la semajno en Pollando; Dimanĉe, panoramo de internaciaj eventoj, esperantista magazino, esperantaj kanzonoj, rubriko por infanoj. Krome, ĉiutage, novaĵoj el Pollando kaj el la mondo.

daŭriĝo de p. 176

daŭriĝo de p. 166

Kaj tiun vojon li iris ekde sia esperantistiĝo antaŭ 50 jaroj, post kreo de sia mondfama metodo antaŭ 40 jaroj — tiu metodo kiu malfermis la mondon kaj riĉigis la vivon al multaj miloj da homoj en ĉiaj landoj — kaj same tiun vojon li iris post fondo de la Internacia Esperanto-Instituto antaŭ 30 jaroj — tiu Instituto kiu donis al la movado eliton de instruistoj disirintaj tra la tuta mondo, aron da valoraj eldonaĵoj kaj faman gazeton.

La plej nova granda iniciato de tiu ĉi mirinda homo, la lanĉo de la metalaj stelmoneroj post pli ol dekjara elprovado de la stela monsisistemo, havu same grandan sukceson kiel ĉiuj antaŭaj iniciatoj. Por ke tiel estu, ĉiuj esperantistoj komprenu ĝian gravecon.

M. H. V.

LA 33-a KONGRESO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

La 33-an SAT-Kongreson, kiu en tiu ĉi jaro okazis en Århus, Danujo, de la 23-a ĝis la 29-a de julio, partoprenis 355 geesperantistoj el 14 diversaj landoj. Inter la partoprenintoj, kion oni devas menciigi kiel tre ĝojigan fakton, estis multaj gejunuloj (la plej granda elcento ĉe ĝisnunaj SAT-Kongresoj). Estas ankaŭ ĝojige ke la honora prezidanto de la Kongreso — urbestro Bernhard Jensen mem estas Esperantisto.

Sabate la 23-an de julio je la 9-a horo malfermiĝis la akceptejo de la Kongreso en la Popola Domo de Århus. Tiun ĉi tagon okazis nur interfratiĝa vespero en libera formo ĉe tabloj. La solena malfermo komenciĝis dimanĉe je la 10-a horo en la urbdoma halo. Post-tagmeze kongresanoj renkontiĝis por komuna fotado en la liberaaera scenejo, kaj poste oni vizitis la tre interesan Malnovan Urbon.

Lunde antaŭtagmeze okazis la unua laborkunsido, dum kiu Redaktoro Barthelmess raportis pri la agado de SAT dum la lasta jaro. Du postaj laborkunsidoj okazis ankaŭ antaŭtagmeze marde kaj merkrede. Diversaj frakciksidoj estis aranĝitaj merkrede de la 13-a horo. Oni preparis jenajn prelegojn por la Laborista Universitato: S-ro Barthelmess pri "Klasika arto", S-ro Prent pri "Principoj de la elektron-tekniko", S-ro Slavko Simuniĉ pri "La laborista memmastrumado en Jugoslavio".

Organiza Kongresa Komitato preparis tre interesan kaj riĉan programon por vizitoj, ekskursoj kaj amuzado. El vizitoj en diversaj fabrikoj kaj laborejoj plej multnombra estis vizito en FDB-kooperativaj fabrikoj en Vibj. La tuta kongresanaro partoprenis marde je la 16-a horo solenan akcepton en urbdomo, kie la simpatia urbestro denove bonvenigis ĉiujn Esperantlingve.

La venonta SAT-Kongreso okazos en Gent - Belgujo.

En resumo, kiel unu el la partoprenantoj, mi povas diri, ke la 33-a SAT-Kongreso en Århus estis bone kaj interese aranĝita, kaj ni ŝuldas dankon al la Organiza Kongresa Komitato pro ĝia granda laboro, penoj kaj zorgoj pri bona aranĝo, kiu rezulte lasis al ni multajn bonajn impresojn de la Kongreso.

Božena Henriksen

A.P.O. Kaj la Poŝtmarkoj

Statistiko la 1-an de septembro: 4650 steloj = 1162,50 gld. Mi akcentas la gravecon de la pionira laboro en aziaj kaj afrikaj landoj. 2-3% el niaj membroj kontribuis ĝis nun per poŝtmarkoj al A.P.O. El tiu nombro proksimume nur 1/3 % per konstantaj kontribuaĵoj. Kompare kun aliaj asocioj, same entreprenantaj, la esperantistoj ne estas tre fervoraj. Tio ĉi ne devas vekti malesperon ĉe niaj fervoraj kolektantoj. Tute male. Se ni komparas la statistikon kun la triona procento, ni devas agnoski la fakton, ke pere de niaj uzitaj poŝtmarkoj ni povus havigi al A.P.O. milojn da guldonoj.

Dankon al niaj fervoraj kontribuantoj! Precipe ni deziras danki al la gelernantoj ĉe Hungara Reĝgimnazio, Kastl (b. Amberg), Oberpfalz, Germanujo, kiujn ilia Profesoro D-ro J. Kondor instigis por kolektiva kolektado. Ekzemplo por niaj esperantoklubo!

Sendu daŭre al: Peter Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago F. Danujo.

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO
N-ro 330

La 1-an de septembro 1960.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de aŭgusto kaj ankaŭ por komparo je la fino de aŭgusto 1959:

	1959	1960
Asociaj membroj	16009	13606
Individuaj membroj		
MJ	823	790
MA	5187	4891
MS	509	549
Pat.	7	5
DM	338	349
HM	45	43
JMJ	28	27
JMA	172	184
	7109	6838
	23118	20444

DELEGITOJ

Argentino

Mendoza (Mendoza) FD (lingvoj/lingvistiko) : S-ro Enrique Rodolfo González, studento, Montecaseros 1853.
Rafaela (Prov. Santa Fe) FD (popol-lernejaj aferoj) : F-ino Ana Visconti, instruistino, Urquiza 576.

Danlando

Brakker (Jylland) D: vakas.

FD (psikologio): vakas.

Faaborg (Fyn): vakas.

Hvidbjerg (Jylland) D: S-ro Heinrich Michels, terkulturisto, Gårslev pr. Børkop.

FD (psikologio): la D.

Kolding (Vejle amt) FD (instruo) : vakas.

Rødovre D : S-ro Sven Ziegler, sekretario en la ministerio de instruado, Jølbyvej 9 B, Vanløse.

FD (Juro) : la D.

Stepping (Sønderjylland) D : S-ro Karl Børstin, instruisto.

FD (instruado) : la D.

Francujo

Arles-sur-Tech (Pyrenées Orientales) D : vakas.

Hyères (Var) VD : S-ro Meliton Salès, florkulturisto, Quartier des Grès.

Le Cailar (Gard) D : S-ro Lucien Angevin, vinberkulturisto.

FD (junulargastejoj) : la D.

FD (religio-protestantismo) : la D.

Paris VD : vakas.

Tours (Indre-et-Loire) FD (asekuro) : S-ro Eloi Motillon, asekuristo, 10 A, place du Huit-Mai.

Germanujo

Burtenbach über Dinkelscherben (Bavarn) D : S-ro Walter Urban, horlogisto kaj optikisto, Am Marktplatz.
FD (horloĝoj kaj optiko) : la D.

Irschenberg ü. Miesbach (Oberbayern) D : S-ro Anton Ohme, rentulo.

Gvatemalo

Guatemala FD (juro) : S-ro Edmundo Quiñones, advokato kaj notario, 3a. C. 3-34 Zona 2. (Oficejo: 9a. C.4-69, Zona 1).

Hispanujo

Cornella (Barcelona) D : S-ro Salvador Aragay, industria desegnisto, Bloque 5-4-2-4 a. C.S.S. Ildefonso.
FD (turismo/tendumado) : la D.

Hungarujo

Györszentmárton (Györ-Sopron VM) D : vakas.

Islando

Höfn (A-Skaftafellss) D : vakas.

Pollando

Piastów ĉe Varsovio (Mazowsze) D : S-ro Jan Pióro, kemiisto, str. Reja K8/19.

FD (kemio) : la D.

Sovet-Unio

Riga FD (literaturo) : S-ino Mirdza Burgmeisters, laboristino, Fr. Engelsa iela 56-7.

Svedujo

Ystad (Skåne) FD (ĵurnalismo) : F-ino Karen Salmose, studentino, Stallgatan 1^a.

Usono

Eastsound (Washington) D : S-ro David Richardson, televida inĝeniero, RFD Box 81 A.

FD (radio/televido) : la D.

Tacoma D : vakas.

FD (radio/televido) : vakas.

Wilmore (Kentucky) JD : S-ro Dona Dayton, studento, 405 Kenyon Avenue.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

531 Carrfors, S-ino Solveig, Bromma, Svedujo.

532 Larsson, S-ro Carl, Västerås, Svedujo.

533 Stenström, Broddaro, Svedujo.

534 Gibson, S-ino Mary J., Riverdale, Usono.

535 Mitchell, S-ro M., London, Britujo.

536 David, D-ro Ed., Nürnberg, Germanujo.

537 Minnaja, S-ro Luigi, Roma, Italujo.

538 Pivac, S-ro G. L., Matamata, Nov-Zelando.

539 D'Estries, S-ino Madeleine, Bay Shore, Usono.

540 Lewine, S-ro John L., New York, Usono.

541 Solin, S-rp Paul, San Diego, Usono.

542 Sloun, F-ino May D. Van, San Franciso, Usono.

DONACO AL ĜENERALA KASO

N.N., Germanujo 9.05 gld.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 18.311,07 gld.

Luis Repini 10.— gld., Argentino; F-ino A. B. Holness 9.37 gld., Britujo; Franz Heidler 0.90 gld., Willy Siefertmann 9.02 gld., Germanujo; A. Pedro Marqueta 3.78 gld., Hispanujo; F-ino A. Laigneau 4.07 gld., Kanado, C. Nelson 10.— gld., Nederlando.

Entute 18.358,21 gld. je 1.9.1960.

Donacu unu milonon — aŭ pli !! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo ! Ankoraŭ ne ĉiuj elspezoj por la Zamenhof-Jaro estas kovritaj.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

Mi korespondas kun ĉiu interesulo precipe kun lingvano ne apartenanta al la hind-eŭropa lingvaro, pri: kio en E estas facila por vi, kio ne! Kio plaĉas al vi, kio ne! Ĉio rilate al strukturo, gramatiko, afiksaro, vortmaterialo kaj formado ktp. Atentu mian jubilean anoncon en jarlibro 1959, p. 33. H. Dresselhaus (Brockmann) en Schloss Holte, Westf., Germanujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Gasthuisstraat 68, Tilburg, Nederlando.

Mi deziras aĉeti n-rojn 537 (1950) de "Esperanto" kaj vol. 1-4; vol. 5 : n-rojn 1-2, 5-12; vol. 6 : n-rojn 1-2, 5-12; vol. 9 : n-rojn 11-12 de "Esperanto Internacia". Dr. W. Lippmann, Grillparzerstr. 4, Hamburg, Germanujo Okc.

Kolektas poŝtmarkojn kun Esperanto-teksto de tuta mondo, uzitajn kaj neuzitajn; rekompence sendas de Sovetunio plenseriojn. Respondo nepre. U.S.S.R. Latvio, Riga 48, Udens-str. 7/1, Ābele J.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj : Dieter Kremp, Kastellstrasse 17, (17 a) Karlsruhe-Durlach, Germanujo Okc.

Erich Klotz, Scheffelstrasse 35, (22 a) Düsseldorf 10, Germanujo, deziras korespondi per p.k. il. tutmonde. Kiu skribos?

Ĉiuj soluloj, kiuj deziras respondon, skribu al la kontoristino A. Granlöff, c/o Hammarforsens Kraft AB, Storgatan, Sundsvall, Svedujo.

"Kio estas amo?" Por kompili tianoman libron ĉiu estas petata respondi al J. Šmits, Cesis, Rigasstr. 31, 1-a, Latvia SSR. Laŭeble, aldonu foton, indiku profesion!

Mil haltu ĉe la "Pordejo de Anglujo" ! Gvidata vizito al romana faroso (lumturo), normanda kastelo grandioza (la "ŝlosilo de Anglujo"), saksa preĝejo, mezepoka kruckavalira restejo, graflando Kent (la "Ĝardeno de Anglujo"), fortikaĵoj, ktp. Haveno 2 kv. km. kun ravaj digpromenejoj kaj marbaniĝo. Klifpromenadoj kun elrigardo ĝis Francujo. Monumentoj pri historio de Dovra Pasejo : Blériot, Rolls, Webb ktp. Granda manifestacio esperantista. Procesio. Partopreno en somera karnavalo. Karavano al Harrogate. Ne mankas ideoj. Vin anoncu jam nun al D. Soleo, Esperanto-Civito, 14 B Castle Avenue, Dover. Kiu helpas pri kosto de reklamado en "Esperanto"?

Aziaj kaj afrikaj samideanoj! Helpu laŭ via povo sendante priskribetojn, bildojn, gazetojn, mapojn, interesajn specimenojn pri viaj landoj al ni 13-14-jaraj 33 gelernantoj, al kiuj oni instruas esperantlingve la geografion de viaj kontinentoj dum 1960-61. Adresu: la 3C-klaso, Somero, Finnlando. Ni respondos al ĉiuj.

Ĉi loka Vespera Lernejo por Plenkreskuloj por la unua fojo ofertas Esperanton kiel plenrajtan lernobjekton kun salajrata instruisto. Salutkartoj amase senditaj el ĉiuj mondpartoj multe helpas al nia sukceso. Ĉiu sendinto ricevos bildkartan respondon. Adreso: Esperanto Class, Adult Evening School, 951 North Hanley Road, University City, St. Louis 30, Mo., Usono.

100 inteligentaj gekursanoj kaj komen-cantoj, 16 ĝis 50-jaraj, en granda in-

dustria urbo Łódź, deziras vige korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj. Leterojn bonvolu direkti laŭ adreso de la kursgvidanto: St. Walicki, Łódź 1, Sienkiewicza 52/34, Pollando.

La pakistanaj Esperanto-lernantoj de S-ro E. Agholm, S.P.J. Box 186, G.P.O. Karachi (West Pakistan), kore

dankas pro la multnombraj salutoj kaj kuraĝigoj ricevitaĵoj el la tuta mondo sekve de artikolo en la maja numero de "Esperanto". Bedaŭrinde ili ne povas al ĉiu afabla skribinto jam tuj respondi kaj petas paciencon.

Komerco per Esperanto kaj Esperanto per komerco. Interesas facile ekspluataj komercaj kaj industriaĵoj ideoj.

Neta profito dividota honoresisteme: 40% ni, 40% vi, 20% Esperantcele. Skribu: Apartado 24661, Mexico 11, D.F.

Instruistoj, kiuj disponas magnetofonon, bonvolu anonci viajn nomojn kaj adreson al Lentaigne, 3 Av. de la Gaillarde, Montpellier, Francujo. Celo: organizi intersanĝojn inter lernejoj.

Oficiala Bulteno

DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

N-ro 2 aperis kaj enhavas artikolon de la prez.
Inĝ. J. R. G. Isbrucker:

"Pri la Vortfarado en Esperanto".

Disvendas U.E.A. Prezo: 1,50 gld., 6 steloj.

Grupestroj !!

Bonvolu sendi al la Centra Oficejo de U.E.A. antaŭ la 1-a de decembro 1960 informojn pri nomo, adreso kaj kunvenhoroj de via grupo por la listo en Jarlibro 1961 (vidu p. 406 k.s. en Jarlibro 1960).

Prezo: unu dekono de jarkotizo MA.

Se vi fariĝas

DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A.

neniam plu vi pagos kotizaltigon!

Decidu tuj! Ĝis la fino de 1960 validos la malnova tarifo!

Nudismo

La populara nova koncepto kaj maniero de vivado.



Inform-folioj nun senpage haveblaj ĉe:

Leif Heilberg, 447 Cole Street, San Francisco, 17, California, Usono

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - poŝformato-jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M)

**Varbu
reklamojn
por jarlibro**

1961

Ĝi enhavu rekordan nombron da reklamoj en ĉiuj landoj!

